

POLA

XXX
JARO

JANUARO
1936

1
NUMERO

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
WYDAWCA

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

Invado de 500 da vikingoj al Polujo...

Sur gigantaj rokoj granitaj, sur postrestaĵoj de la Skandinavia Glacieto, ekfloris vivo, elkreskis admirinda ŝtato kaj popolo — Svedujo kaj la Svedoj. La malvarman landon de l' nordo, la malmolan rokaron de Skandinavio okupis popolo, kiu per sia laboremo kaj per nekalkuleblaj bonaj trajtoj „varmigis“ la landon kaj „malmoligis“ la graniton...

Karaj gelegatoj, kiam vi preparos vojaĝon al Svedujo, ne demandu multe la geografiistojn kaj la geografio-librojn pri konsilo; — niaj ŝatataj scienculoj-geografiistoj, ofte vagadas en la scienco kaj la priskriboj de iuj landoj kaj popoloj restas teorie bone argumentitaj... Oni do konsilos al vi, por aŭgusto kunporti al Svedujo bonan pelton... kaj alia diros al vi, ke oni rigardos vin tie kiel ion eksterordinaran, se vi ne estas alta helblond-harulo...

Iun ĉarman matenon aŭgustan, de la jaro pasinta mi estis „transsaltinta“ la maron de Abo en Finnlando kaj atingis Stokholmon... Ĉarmaj, revaj, neforgeseblaj, ensorĉigaj, k. s. k. s., — vortojn mi ne trovas por esprimi ĉion, kion mi sentas kaj kion oni diri devas pri Svedujo, — sed hodiaŭ mi ne parolos pri Svedujo, hodiaŭ mi devas averti vin, Polaj Esperantistoj, per la S. O. S., ke ĝuste el tiu lando, la Vikingoj, en 500-persona armeo, ne nur „altaj blonduloj“, sed ankaŭ mezkreskaj malhelharuloj, ne nur Vikingoj, sed ankaŭ ĉarmaj Vikinginoj, ne nur „flegmatikaj“, tiuj de kelkaj ge-

ografio-libroj, sed tiuj el Svedujo, varmaj, eĉ varmegaj gekavaliroj, armitaj per akraj, 5-pintaj... verdaj steloj kaj bonegaj lingvoscioj, preparas invadon al nia lando...

Jen mi eksciis kaj malkaŝas la sekreton, kredo al mi, ĉar povas esti tro malfrue... Atentu, memoru, kaj juĝu mem kion fari...

Anstataŭ „nur sovaĝaj grandegaj rokoj“, mi trovis en Svedujo verdajn kampojn, gigantajn fabrikojn kaj blankajn, neĝe blankajn domojn — pardonu, ne domojn, — kastelojn, — tiel ĉi nomas ĉe ni similajn, — anstataŭ malrapidemaj svedoj, mi trovis temperamentoplenajn vikingojn kun varmegaj kaj gastamaj koroj, — kaj... tiom da esperantistoj, — ke mi nur demandis: — Dio mia, ĉu sur la sveda granito, post pluvo, kreskas kun fundoj ankaŭ esperantistoj?... Kial tia pluvo ne kreskigas iom da esperantistoj en la polaj arbaroj, kie sole fungoj kreskas...

Jen, unu verda vikingo, Ernfrid Malmgren. (en parantezoj mi aldonu, ke tre „dangera“ — ĉar tra la tuta lando li iel semas kaj kreskigas esperantistojn...), gasteme akceptis min en sia hejmo, kaj kiam lia ĉarma edzino regalis min per — ha kiom bongustaj — kafe kaj kukoj, li klopodis ekscii de lia 500-persona verda armeo, kiu per speciala ŝipo venos al ni, trovos por si...

Sed mi ne forĝesis, mi manĝis la dolĉaĵojn kaj trinkis la kafon, sed mi ne

perfidis la staton de nia verda armeo.. Cetere, mi pensis, ni ankoraŭ havas iom da tempo, la marŝo de la Svedoj estas preparata nur por aŭgusto 1937, dum la 29-a Universala Kongreso de Esperanto en nia ĉefurbo Warszawa, kaj ni povas ankoraŭ plifortigi niajn verdstelajn poziciojn.. Tial mi ne multe parolis, mi preferis aŭskulti pri tiu unika verda marŝo de 500 da vikingoj al Polujo...

Ĉu mi jam konvinkis vin? Mi mem konvinkiĝis kaj ekkredis, tio estas certa, — se la Svedoj preparas alvenon, ili vencs.

La Svedoj sukcesigas siajn entreprenojn, ili ankaŭ sukcesigos tiun aranĝon. La Sveda Esperanto Federacio laboras nun laŭ 5-jarplano, kiun oni efektivas kun multprocenta superigo. Ni estu do preparitaj al tiu „invado“...

Iam, antaŭ kelkcent jaroj, la sveda junulo-reĝo, Karlo la XII-a invadis nian landon. Li, kun sia armeo, trairis ĝin de nordo al sudo, preskaŭ sen malhelpo. N'aj tiamaj kavaliroj, la patroland-defendantoj komence ne sukcesis haltigi la invadon de la tiamaj, militemaj Svedoj...

Nun atendas nin alia invado; venos al ni Svedoj el tiu Svedujo, kiu dum pli ol 100 jaroj vivas pacan kaj malmiliteman vivon, venos al ni kavaliroj de la verda frataro, homoj, pri kiuj oni povas diri ĉiujn eblajn boneco-superlativojn kaj ne estos tro... Ni ne timu do danĝerojn, la Svedoj nek estas militemaj nek okupemaj, des pli, svedaj verdstelanoj...

Sed tamen...

Kontraŭ la invado de la svedaj esperantistoj ni ne devas konstrui tranĉeojn, ni ne devas starigi defendeojn, — sed ni devas prepari domojn, homojn, familiojn, kie regos la internacia interkomprenilo Esperanto, kiel ĝi regas en mul-

taj, eĉ multegaj familioj en Svedujo. Se nin atendas danĝero flanke de la svedaj esperantistoj, flanke de tiu verda karavano, kiu venos al la 29-a en Varsovio, ĝi povas esti hontigo kaj ruĝigo, se niaj verdaj kadroj ne estos plifortigitaj ol ili estas nun...

Jen mia S. O. S.—voko, — mi diris, ke ne estas tro malfrue, sed jam ne estas frue: la 29-a Universala Kongr. de Esp. en Varsovio, estos samtempe la 50-jara jubileo de Esperanto, kiu ekkreskis en nia lando. La tutmonda esperantistaro vencs al ni multope, ĝi volos vidi niajn fortojn, nian verdan armeon, pretan por plua batalo ĝis fina venko de la alta ideo, kiu venkis kaj venkas fortajn batojn, portante bonon al la homaro.

Ĉu por ni, polaj esperantistoj, ne estus ekzemple forta bato, se ni ne povus en Varsovio kontraŭstarigi almenaŭ 1000 esperantistojn - kongresanojn el nia 33.000.000, granda ŝtato kaj popolo?...

Jen nia devo, ni ne povas permesi, ke ni estu „englutitaj“ de niaj karaj gastoj. Por inde akcepti niajn gastojn, ni devas havi, almenaŭ po 2 personoj je 1... Sed ĉu ni sukcesos?

Tial mi vekas S. O. S. pri invado, ni devas sukcesigi tiun aranĝon, oni devas eklabori kiel eble plej baldaŭ, oni devas streĉi ĉiujn fortojn, por montri al niaj gastoj tion, kion ili atendas de ni...

Por sukcesigi la 29-an en Varsovio, kaj por festi la 50-an jubileon de esperanto ni devas prepari kaj ekzerci esperantistan armeon, kiu ĝis nun ne estas kompleta. Ĉar la tempo urĝas, mi finas per voko: S. O. S. pretiĝu por inde akcepti 500 da Svedoj kaj multajn centojn da alilandaj samideanoj. S. O. S.!!!

Henryk Gielb.

PRI LA POLA TOLEREMO KAJ PACAMO.

Se mi volas paroli pri la pola tolereemo kaj pacamo, kiuj ĉiam antaŭe reprezentis kaj reprezentas ankaŭ nuntempe la karakterizajn konstituciajn ecojn de la pola ŝtato — tiam mi devas reiri al la historia pasintaĵo, por montri en mallonga historia skizo kelkajn sufiĉe gravajn momentojn de l' pola historio, kiuj konfirmas, ke Polujo jam de post sia komenco aplikis ĉiam tre larĝan religian toleremon kaj ke ĝi staris ĉiam je la gardo de l' paco. Kiam dum kaj post la krucmilitoj judoj el ĉie estis forpelataj kaj persekutataj — tiam ili trovis rifugejon kaj azilon en Pollando, kie ili

atingis liberajn leĝojn kaj ili povis konfesi senĝene sian religion. Eĉ de nomo ne estis konataj en Pollando tiuj kruelaj persekutoj, kiujn spertis judoj preskaŭ en la tuta Eŭropo. Al la milda kaj indulgema naturo pola ĉiu perforto estis ĉiam abomena: neniam judoj estis elpelataj el polaj urboj kaj neniam oni persekutis ilian religion.

La judoj — skribis unu el judaj gazetoj (Moriah) ĝuis ĉiam en la sendependa pola ŝtato tre larĝan liberecon kaj grandaniman toleremon. Pollando ne konis la religian fanatikismon kaj ĝi lasis la problemon religian al ĝiaj loĝantoj mem.

Jam dum la sinodo en Konstanco (1414 j.) la rektoro de la Krakova Universitato Paŭlo Włodkowiec anoncis la principon „ke la religio ne povas esti eldevigo”.

Tiu vidpunkto ektriumfis precipe en la renesanca epoko. La reformacia moviĝemo aperis pli frue kaj enradikiĝis en Pola Respubliko, kiu estis ĉiam kunigitaj per miloblaj ligiloj kun Okcidento kaj kiu ĉerpis abunde el la centroj de ĝia intelekta vivo kaj kuluro.

La humanismo pretigis la fundon por la religia reformo. — Tiaj familioj polaj kiel de Radziwiłł, Leszczyński, Stadnicki, Zborowski, Łaski fariĝis protestantoj. En Polujo stariĝis senĝene protestantaj eklezioj, lernejoj kaj komunumoj. Aperis multaj sektoj, ekz. la sekto de arianoj k. t. p. Tiun grandan ŝanĝon de la religiaj konvinkoj akompanis en Polujo tia toleremo, kia en tiama Eŭropo estis ne nur ne konata, sed ankaŭ oni ne povis ĝin kompreni... En Okcidento suprenleviĝis ŝtiparoj, sur kiuj bruliĝis la herezuloj. Per torentoj fluis la sango al „dia gloro”. Polujo tamen ne konis inkviziciajn torturojn. Ĝi ne perfortis konsciencojn kaj ĝi ne kaŭzis religiajn militojn. Depost la komenco de l' reformacio en Polujo ekregis la konfesia libereco, kvankam la reĝoj estis katolikaj.

Tiutempe, kiam diversaj dukoj de Eŭropo persekutadis siajn subulojn, kiuj kredis alie ol ili — laŭ la devizo „cuius regio eius religio” — tiam la granda kreinto de „lublina unio” — liganta Polujon kun Litovujo — la lasta Jagielido, Sigismundo Aŭgusto, elparolis tiujn eterne memorindajn vortojn: „Mi ne estas reĝo de viaj konsciencoj”. Kaj la alia granda reĝo pola, Stefano Batory, deklaris: „Mi opinias, ke la kredon oni ne povas disvastigi pere de persekutadoj kaj pere de la sangverŝo kaj oni ne povas devigi la homajn konsciencojn per la perforto”.

Do, kiam en la Okcidento la fanatikismo furiozis, en Polujo la eterne memorinda seĝma leĝo tiel nomita: „De pace inter dissidentes”, 1573 j. egalrajtigis ĉiujn konfesojn en la lando, kaj ĝi deklaris, ke neniu en Pollando povas esti persekutata kaŭze de siaj religiaj konvinkoj.

Cu estas mirinde, ke al tiu lando de la religia libereco, kaj toleremo turnis sin la okuloj de ĉiuj, kiuj suferis pro siaj religiaj konvinkoj. Erazmo de Roterdamo laŭdis la pensliberecon en Polujo kaj la hugenoto post la Bartolomea nokto postulis, ke la franca reĝo faru à l' exemple de Pologne (laŭ la pola ekzemplo).—

Tia toleremo regis antaŭe kaj ankaŭ nuntempe regas en nova liberigita Respubliko Pola.

Tiel same estas kun la pola pacamo. Pollando neniam kaŭzis konkerajn militojn kaj la konkerojn ĝi faris nur pere de la moralforto. Poloj eltiris siajn glavojn nur por neevitebla memdefendo kaj tial la milito nomiĝis en Polujo tre karakterize: „la neceso”.

Ce aliaj nacioj je la lulilo de l' nacio staris tre ofte la mito pri ia granda konkerinto aŭ ofte eĉ pri la granda krimulo kiel pri la fondinto kaj kreinto de la koncerna ŝtato — en Polujo tamen la fondinto de la ŝtato — laŭ la mito — estis la reĝo terkulturisto Piast, la enkorpigo de la kreanta paca laboro. Kaj ĉu ĝi ne estas karakteriza por la pola pacamo, ke nur unufoje en la pola historio la nomon de „Granda” ricevis de sia nacio ne iu eminenta militisto, sed la reĝo, kiu publikigis la leĝaron (t. n. statuton de Wiślica) — kaj kiu fondis la unuan Universitaton en Krakovo (1364 j.) kaj starigis multajn monumentajn konstruaĵojn kaj tutajn urbojn. Do — la reĝo — konstruisto, amiko de l' paca laboro kaj tiu reĝo estis Kazimiro la Granda.

Kvankam la Pola Respubliko estis iam unu el plej potencaj ŝtatoj en Eŭropo, ĝi tamen neniam estis militema kaj ĝi ne havis avidon de l' mordregado, kiu aliloke detruis tiom da landoj kaj elverŝis terurajn sangmarojn. Poloj ne serĉis la gloron en militaj aventuroj kaj ili amis la pacon. Franco Choismin sendita al Polujo (1503 j.) skribis kun admiro: *Cette nation deteste l' effusion du sang si ce n' est contre les ennemis déclarés* (tiu nacio malamas la sangverŝon, esceptinte, se ĝi havas kontraŭ si la deciditan malamikon).

Malgraŭ tiu pacamo — Pollando estis militista potenco, — tamen ĝi ne uzis la batalilon por ataki kaj forrabi, kontraŭe ĝi defendis sin nur kontraŭ la atakoj. Ĝi estis la antaŭmuro kaj ŝirma digo de Eŭropo. Se dum kvin jarcentoj la ondoj de l' amaso da mongoloj kaj turkoj ne disrompiĝus antaŭ la pola digo, Eŭropo neniam venus al tia disfloriĝo. Tiuj samaj principoj de la toleremo kaj pacamo, gvidas kaj direktas la nunan politikon de Polujo. La sistemo de multflankaj aliancoj, kaj ne atakoj, kun siaj najbaroj, kiun aplikas la moderna Pollando atestas plej bone pri la toleremo kaj pacamo de la Pola Respubliko.

Tadeusz Biliński.

PRI KOLENDOJ.

En la spirita trezorejo de ĉiu kultura nacio apud unuagradaj juveloj troviĝas kutime ankaŭ ŝtonoj de malpli granda brilo, ne tiel bonegaj, kaj tamen de tiu nacio altestimataj; kuniĝis kun ili rimarkinda „pretium affectionis“. Tiamaniere en la pola trezorejo apud „Sinjoro Tadeo“ kaj „Reĝo-Spirito“, apud polonezoj kaj mazurkoj de Chopin, ni havas ankaŭ kolendojn. Ne tiel geniaj, ne tiel grandiozaj, ne donantaj tiom profundajn skuojn de l' animo, kaj tamen strange de la nacio amataj kaj estima aj, kiel unu el gravaj aperoj de nacia animo. Ankaŭ aliaj nacioj posedas siajn kristnaskajn kantojn. Posedas la Rutenoj siajn „koljady“, la Germanoj siajn „Weihnachtslieder“, la Francoj siajn „Noëls“; kelkaj el ili, precipe la francaj, estas ankaŭ tre belaj kaj allogaj. Sed verŝajne nenie tiuj ĉi kantoj por la Kristnasko iĝis io tiel forte „nacia“, tiel strange de la tuta nacio amata kaj flegata, kiel en Polujo. Kiamaniere tio fariĝis?

Se por la Polo la termino „kolendo“ kuniĝas senprokraste kaj nerevokeble kun tuta vico de sentaj asociacioj, tiam serdube agas en tiu direkto antaŭ ĉio rememoroj de infaneco: Kristnaskfestoj, antaŭvesperoj, kristnaskarbetoj kun ĉiuj ties surprizoj kaj pompoj; rememoroj de festa tago ĝisfunde familia; rememoroj pri tiom impresanta imagpovon meso pastista — precipe en kamparo — dum frosta, brileganta lunnokto. Ĝenerale — rememoroj de tiu ĝojplena speciala agordo, kiu dum antaŭfestoj kaj festaj tagoj ekposedas ne nur homojn, sed eĉ la tutan mondon (tio ne aliĝas la fakton, ke tiun agordon la homo mem metis en la naturon). Jen inter memoraĵoj de infaneco tiuj ĉi estas eble plej ĉastaj, plej belaj, plej multe liberaj de almiĝaĵo de ia ajn malbono, kaj tiuj ĉi plej forte fiksiĝas en memoro. Kaj kune kun ili evidente ankaŭ la kristnakkanto, tiel nedisigeble kun ili kuniĝita. Kaj ĉar la tuta nacio tiujn festojn tiel solenas, ĉar preskaŭ ĉiu pola infano — en pli aŭ malpli granda grado, sed ĉiu — travivas tiujn emociojn, do ne io stranga, ke kun la termino „kolendo“ kuniĝas asociacioj jam ne nur individuaj, sed ankaŭ kolektivaj.

Sed tio ne sufiĉas. Ĉe aliaj nacioj ja la kristnaskfestoj ankaŭ estas tia familia festo, postlasanta neforgeseblajn rememorerojn en la animo de l' infano. La dua kaŭzo, ke por la Polo la kolendo i-

ĝis io tiel grandvalora, estas tiu, ke ties evoluo iris laŭ strange feliĉa vojo. Sur la vojo de tiu evoluo, komencante de mezepoko, ĝi ensorbis en si tutan vicon de tre karakterizaj elementoj de l' animo nacia. Estas en ĝi — same en teksto, kiel ankaŭ en melodio — indeco kaj spiritatento, kaj altfluga temperamento sarmata kaj slava-pola medito kaj sopiro, estas kortuŝo kaj sentemo, estas humoro kaj melankolio samtempe, estas vervro kaj impeto de kontuŝ-nobelo kaj krakova vilaĝaro. Estas principe la samaj elementoj, kiujn ni trovas ĉe Chopin kaj Moniuszko, ĉe Kochanowski kaj Mickiewicz, ĉe Lenartowicz kaj Słowacki, ĉe Matejko kaj Chełmoński. En la kolendo ili estas evidente senfine pli simplaj, primitivaj, sed en ilia esenco ili estos la samaj; la sama pola animo respeguliĝis en ili. Oni eĉ povus diri, ke konsiderante unu aferon, el sociologia vidpunkto, la kolendo havas tie ĉi kvazaŭ ian supercon: dum eminentaj verkintoj en urfakte estas l' esprimo de l' animo nacia, sed tra prismo de ilia granda individueco, la kolendo estas kvazaŭ kolektiva respegulo de l' animo de simplulo kaj de saĝulo, de l' infano kaj de matura homo; ĝi alparolas al ĉiuj kaj el ĉiuj.

Jen tiu kuniĝo de tiuj ĉi du faktoj: de kuniĝo kun rememoroj de l' infaneco kaj de poleco, kaŭzis, ke verŝajne nenie en la mondo kolendo, kanto por Kristnasko, kanto religia sed ankaŭ samtempe mondara, estas tiel disvastigita en tuta socio, nenie iĝis tiel ĝenerale akceptata kaj amata, kiel en Polujo. Ĉiuj ni kantadas kaj sentadas la kolendojn: ni kantadas ilin en preĝejo kaj hejme; kantadi ni povas ilin en ĉiu agordo de spirito, ĉar al ĉiu oni povas alĝus igi konvenan tekston kaj konvenan melodion. Kantadas ilin urbo kaj vilaĝo — precipe la lasta: sufiĉas atente aŭskulti kolendojn laŭte eksonantajn en ia vilaĝa preĝejo, kaj oni komprenas, kio ili estas por tiu popolo, kiel forte ĝi familia iĝis kun ili. Kantadas kolendojn la tuta Polujo, ties ĉiuj provincoj kaj gentoj; de Polesio ĝis Silezio, de Kaŭbio ĝis Podhalo: ĉie sonas kolendo, kaj ĉie la sama! Kaj ne nur hodiaŭ, ĉar ankaŭ en pasinteco ni povas observi neordinaran popularecon kaj disvastiĝon de kolendoj, jam de duono de XVI. jarcento, se ne pli frue, kies pruvo estas multombraj kolektoj de kolendoj, kaj konstantaj a-

ludoj en la literaturo, kaj grandega disvastiĝo en malnova lingvo de terminoj „kolendo“, kolendi“, kaj ankaŭ en pliaj, metaforaj signifoj (kio pruvas profunde kaj malnovan enradikiĝon de l' esprimo kaj termino origina), kaj serio de atestoj historiaj. Estas karakteriza afero, kiel niaj grandaj poetoj inter siaj rememoroj el junaj jaroj akcentas potencon kaj racion de rememoro de kolendo, de tiu „kolendo serena“, kiu „en bakejo iom malheligita ploris en ritmoj plej mizeraj vestita“ (Słowacki: Ora Kranio), kaj kiel al ties efiko aljuĝas grandan rolon en siaj spiritaĵoj: kolendo akompanas batalon pri animo de Konrad (en la tria parto de „Dziady“ de Mickiewicz) kaj iĝas unu el faktoroj por venki la malbonon; kolendo, dum antaŭfesta nokto, apud fajrujo hejma en animo de alia Konrado kvietigas furiozantajn en ĝi maltrankvilojn, finon farante al lia vagado kaj al lia turmento (Liberigo).

Enfante en animon de Polo dum jaroj infaraj, kolendo akompanas lin fidele dum plua vivvojo. Kiom do fojoj ĝi donis al li momentojn de feliĉo, eĉ se nur per deturno de mizero kaj de ĉiutaga grizeco kaj per translokiĝo en komplete aliajn mondojn! En fremdlando ĝi donis al li impreson de patrujo, tran-

sportinte animon sopirintan al malproksima hejmlando. Ĝi iris kun la ekzilitoj al Siberio, kaj tie ĝi dolĉigis al ili ilian teruran sorton. Dum la mondmilito polaj soldatoj en la aŭstria armeo, skribante dum la festa periodo leterojn al familio, vestis ilin ne unufoje en formon versan, kaj nome en formon de kolendoj, t. e. de tiuj artverkoj, kiuj al iliaj animoj plej forte ekparolis kaj kun kiuj ili plej multe familiarigis — tiu do formo estis kvazaŭ helpo en la priskribo de iliaj sentoj. En la j. 1915 sur la fronto franca-germana okazis onidire fako, kiu pli elokvente ol ĉiuj argumentadoj ilustras kvaliton kaj intensecon de senta reago de kolendo sur la polan animon. Dum la antaŭfesto de tiu jaro, vespere, el remparoj francaj aŭdiĝis tonoj de pola kolendo; kantis ĝin polaj volontuloj en la franca armeo. Post iu tempo aŭdiĝas la sama kolendo el nemalproksimaj remparoj germanaj; tiel respondis je alvoko polaj soldatoj, devigitaj servi en armeo germana. Dum tiu nokto tiuj „malamikoj“ ne pafis al si...

El prelegoj universalaj de
prof. dr. St. Dobrzycki †.
E-igis Bogdan Miądowicz.
(P o z n a ŝ)

NEORDINARA JUBILEO.

Antaŭ 2.000 jaroj (en la oficjaro de romaj konsuloj: Lucius Aurelius Cotta kaj Lucius Marcius Torquatus) en decembro de 65 jaro antaŭ Kristo naskiĝis en Venusia, urbeto kuŝanta ĉe fama Via Apulia en suda Italujo ĉe limo de Apulia kaj Lukania la fama poeto romana:

QUINTUS HORATIUS FLACCUS.

Lia patro, liberto (t. e. eksa sklavo), mastrumis sian bienon kaj zorgis pri la edukado de sia filo, montrante tre simpatie la komprenon pri la valoro de klerigo. Por liveri al la filo plej bonajn instruistojn ŝanĝis la patro sian sidejon kaj elmigris Romon, kie li trovis taŭgan instruiston Orbilius, memorigatan de Horatius kun la moknomo: plagosus (= bastonpunema). Tie lernis juna Venusiano la grekan lingvon, legante Homeron.

La plej alta ŝtupo en la edukado de romanaj sinjoridoj estis edukado en filozofio, retoriko, dialektiko, iom da muziko, matematiko en famaj grekaj skoloj en Atenoj, ekz. Akademio (fondita de Platon), Promenskolo (peripatetika de Aristoteles), stoika, epikurea kaj aliaj skoloj.

Estis ambicio de patro havigi al sia Quintus sinjoridan edukon en filozofiaj doktrinoj en Atenoj, kie Horatius tuj ekbrilis, verkante dum siaj studjaroj la unuajn poeziprovojn en greka lingvo.

Sed la senzorgema studado estis interrompita per neatendita, ĉiun Romanon ekskuanta sciigo, venanta el Romo, pri la mortigo de „tirano“ Julius Caesar per la mano de fanatikaj respublikanoj, gvidataj de Marcus Brutus (en 44 j.). Sed la opinio en Romo, komence entuziasmigita pro liberiĝo el tiranio, baldaŭ ŝanĝiĝis kaj la konspirantoj estis devigitaj serĉi rifugejon, kiun ili trovis unue en Etrurio, poste en Grekujo. Tie Marcus Brutus provis reorganizi sian armeon kaj serĉis taŭgajn militistojn inter la romana junularo, studanta tiam en Atenoj.

Horatius, la plej talenta en ĝi, turnis al si la atenton de respublikana defendisto, kiu nomis lin tuj tribunus militum (do: Komandanto de legio). Tiaj junaj komandantoj sen militista antaŭprepariĝo ne povis bone influi la armeon aŭ vekti bonŝancajn atendojn por la okazo de militagoj. Kaj kiam venis la unua armilkon-

flikto (ĉe Philippi en 41 j.), la armeo de Brutus, atakita de veteranaj legioj de Octavianus, tuj senorde disŝutiĝis kaj serĉis savon en malhonora forkuro. Horatius permesas al si pli poste moki tut-sincere sian tiaman forkuron kaj forĵeton de armilaro. La afero de respublikanoj estis en unu batalo perdita kaj kiu ne intencis plu partopreni la militon, atendis la amnestion de la venkinto.

Horatius revenis Romon kaj serĉante ian vivpozicion li akceptis postenon de simpla skribanto en oficejo de iu kvestoro (=imposta oficisto). Sed pli forte ol kalkulaj listoj, altiris lin lia Muzo, kiu subŝovis al lia menso rimarkojn pri socia vivo, pri homaj mankoj, ridindaĵoj, senhonestajoj. Tiujn observaĵojn enestigis Horatius en novan formon de satiraj babilajoj („Sermones“) laŭ ekzemplo de sia antaŭulo en tiu speco: Lucilius, aŭ en formon de jambaj distiĥoj laŭ antikva modelo de greka jambografo Arĥiloho el VII jc. Tiuj versaĵoj atendiĝis la tiamajn altnomajn poetojn: Vergilius kaj Varius, kiuj helpis entiri Horacion en plej altajn sociorondojn de Maecenas kaj eĉ de Aŭgustus. Gajninte per ili sendependecon de ĉiutagaj zorgoj ekbrilis nun Horatius kiel poeto-artisto, kiu la unua alkonformigis la grekajn, lirikajn versaĵformojn al la lingvo kaj mondkompreno de Romanoj en kvar volumoj de „Carmina“. Ekster tiuj versaĵoj postlasis Horatius du volumojn de „Leteroj“ direktataj al siaj amikoj kun tre subtilaj pensoj kaj sentoj, kun eniĝemaj rimarkoj pri literatur-konantoj kaj literaturproblemoj. Tiu speco de poeziaj leteroj ĝis tiam ne ekzistis kaj estis nova ideo de Horatius.

Plej grava por postaj generacioj estas la „Letero al Pizonoj aŭ pri la poezia arto“, entenanta akrevindajn rigardojn sur la verkadon, sur la formon, versan konstruon, temoelekton, talenton, diligentan sinekzercadon, sen kiu granda talento ne sufiĉos verki indan artaĵon, la verkisto devas ĉiam pliperfektigiĝi, ĉar por mezkvalituloj ne enestas loko inter veraj poetoj.

La 17 jaro antaŭ Kristo estis tre grava pro la decido de imperiestro pri aranĝo de solenaj festoj okaze de jarcentŝanĝo per kiuj Aŭgustus intencis tiam aldoni solenan kaj religian brilon al siaj freŝaj militsukcesoj (venko je Partoj en Azio) kaj al fermo de ĝisnuna periodo de militskvoj. Horatius estis invitita verki konvenan jubileokantaĵon. La inspiroplena kanto sub la titolo:

„Carmen saeculare“ („Jarcentfesta kanto“) estis solene kantata de elektita ĥoro de romanaj geknaboj sur Palatino kaj sur Kapitolio; ĝi gloris la diojn pro ekstantajn Romon kaj petpreĝis benon kaj prosperon por nova jarcento.

La „Leteroj“ kaj la kvara volumo de „Poeziaĵoj“ estas la plej altgustaj kreazaĵoj de poeto, kiu pli poste ne revenis al sia liuto kaj en trankvila akordiĝo finis sian vivon en la 8 jaro post Kristo en sia sabina vilao.

La poezia postlasaĵo de Horatius nombre ne estas tro granda, ĉiuj liaj poeziaĵoj formas unu negrandan libron — kaj tamen li estis respektata kiel altranga artisto kaj plej signifa poeto. En siaj versaĵoj li ne serĉis la aplaudon de simpla, ĉiutaga popolaĉo, li ne flatis ĝiajn plaĉojn, re malieviĝis al ĝiaj kompreno kaj ŝanceliĝemo. li eĉ vorte vipobatis ĝin „Odi profanum vulgus“ — („Jen for, profanpopolo!“) svingante sin ĉiam al pli altaj ŝveboj kaj rifuĝante al la intima interparolo kun belspirituloj kaj postulemaj gustkonantoj. Sed skribante eĉ ne por ĉiutaga gusto, prezentis la poeto ankaŭ al vasta popolo la idealojn de patrijamo, konkordo, bonaj moroj, religio, amikeco k. t. p.

Lia sindeteno igis lin gardi pleran sendependecon kaj vortliberecon en la rilatoj kun pli potencaj siaj amikoj kaj eĉ kun la mondpotenculo Aŭgustus, kio tiom pli alklinigas lin al nia ŝato kaj koro.

Liaj verkoj diskutataj perlojn de honesta filozofio estis objekto de studado kaj admiro dum la mezaj kaj novtempaj jarcentoj en ĉiuj landoj. En krakova universitato liaj verkoj estis komentariataj de post la XV jarcento, multaj niaj poetoj subiĝis al lia influo ne nur en antaŭaj jarcentoj (kiel ekz. Kochanowski, Sarbiewski), sed ankaŭ ĉiuj novtempuloj. Eliris multaj polaj tradukoj de liaj poeziaĵoj, tre ofte estas sentebla lia influo je kleraj skribistoj trovantaj inspiron kaj ĝuon en lingva beleco, en la pensoj kaj idealoj de poeto Venusinus. Kaj ĝis daŭros, ĝis kiam la poetoj estos serĉantaj fontojn de inspiro; tion ili trovos certe ĉe Horatius Flaccus.

En decembro 1935 j. tuta mondo esprimis sian homagion al la granda spirito en disertacioj kaj verkoj pri Horatius; al tiu laŭrkronaro estu aldonita almenaŭ tiu modesta roto ankaŭ en nia lingvo.

Wejherowo, en decembro 1935.

Józef Orzech.

M. SELIM.

ĈU MI HAVAS LA HONORON KUN FRAŬLINO...?

(Skizo)

Depost jaroj mi renkontas ŝin ĉe la tramostacio apude de la ĝardeneto. Mi memoras ŝin, kiam ŝi estis ankoraŭ preskaŭ infano, lernantino, kiam ŝi kutimis ĉi tie matene atendi tramon, por veturi en la lernejon. Ŝi kutimis tiam senpacience transjeti la paperujon de unu mano al la alia kaj jeti nervajn rigardojn sur la manan horloĝeton.

Ŝi elkreskis en belan, florantan knabinon kaj mi rigardis ŝin kun ravo. Kaj tiam ŝi jam kutimis ĉi tie interkonsenti rendezuojn ĉe la tramostacio. Somere ŝi portis helan mantelon, vintre peltan sportjaketon. Ŝiaj grandaj okuloj elsprucigis lumon kaj junecan ĝojon. Kiam ŝi alproksimiĝadis al la stacio, jam atendadis ŝin studento aŭ ordinara junulo kaj ŝi alpaŝadis al li balanciĝe, dance kaj la densaj bukloj, kiuj elstaradis el sub la malgranda ĉapeto kundancadis, logadis kaj ravadis. Mi kutime postrigardis kun jaluzo la junulon, kiun ŝi ekkaptis kun tia suna rideto subbrake kaj malaperadis kun li ien, en la forajn stratojn.

Kaj la jaroj forflugadis. Ŝiaj membroj perdis kun la tempo tiun junecan elasticcon kaj estingiĝis ankaŭ tiu ĉarma juneca brilo en ŝiaj okuloj, kie eksidis ia melankolio, kiun mi iafoje rimarkis jam dum ŝia junaĝo, renkontante ŝin sidanta sola ie surbenke en ĝardeno aŭ la aleoj. Ankaŭ ŝiaj movoj iĝis iel lacaj, mallaborremaj.

Mi vidas ŝin ankaŭ hodiaŭ atendanta rendezuon ĉe la sama tramostacio vintre en pelto kaj somere en malhele griza supervesto. La vizaĝo pala pro troo da pudro kaj pro laceco. Ŝiaj grandaj okuloj jetas nervajn, melankoliajn rigardojn ĉirkaŭen. Ĉirkaŭ ŝi staras junaj knabinoj kun kolorigitaj lipoj kaj pudritaj nazoj, komencantinoj en la rendezuofako, junuloj glate razitaj kun bele kombitaj hartufoj paŝas nerve tien kaj reen, rigardas sin ŝtele en poŝaj speguletoj. Ĉiu atendas proksimulon, konaton, kiun oni salutas per rideto kaj eble per ĝoja tremeto. Ne unu el ili pensis eble la tutan tagon pri la jena rendezuo kaj spinis fantaziojn pri bonaj dolĉaj minutoj kaj ŝi atendas ĉi tie tute fremdan, nekonaŭtan, — intervidiĝon.

Jen alproksimiĝas iu junulo, freŝe razita, en gantoj, li rigardas ŝin explore,

per malcertaj rigardoj, alpaŝas al ŝi kaj demandas hezite:

— Ĉu mi havas la honoron kun fraŭlino...?

Tiam ŝi lasas konduki sin de ĉi tiu tute fremda homo ien tra fremdaj malvarmaj stratoj. Oni parolas pri v'rina malakurateco, pri vetero kaj pri virinoj, kiuj kolorigas sin kaj kiuj ne kolorigas sin. Poste oni eniras ian malbruan sukerafejon, kien venadas malmultaj homoj, plejparte enamiĝintaj paroj aŭ homoj, kiuj ŝatas solecon. Ĉi tie interplektiĝas serioza interparolo.

Ŝi jam havas praktikon. Ŝi jam „transjetis“ dum la lasta kelko da jaroj dekojn da junuloj. Inteligentuloj, kiuj parolas pri teatro, kino kaj libroj; komercistaj junuloj, kiuj parolas nur pri komerco, mono kaj praktikaj aferoj; junuloj kun malĉastaj rigardoj, „certuloj“, kiuj estas certaj pri sia sukceso kaj priŝutas per dusencaj ŝercoj kaj junuloj hontemaj, senhelpaj, silentemaj, kiujn oni devas tiri per la lango. Ŝi jam scias, kiel kaj kion priparoli kun ĉiu el ili.

Ŝi parolas kaj trinke'as la malvarmiĝintan teon kaj el sub la pudro elrigardas laca, maljuniĝinta vizaĝo kaj paro da malgajaj, lacaj okuloj, kiuj ŝajnigas rideton. Kaj ŝi pensas dume pri la patro en la uzdifektita surtuto, kiu ĝemas pro ŝi ĉiunokte en la lito, antaŭ ol li endormiĝas, kaj pri la patrino, kiun doloras la piedoj kaj ve'uras ĉiujare al Cieĥocinek kaj pri la pli junaj spritaj fratinoj, kiuj mem eltrovis al si knabojn kaj rigardas ŝin kun ironio kaj moko, kiam ŝi revenas de intervidiĝo...

Tiam ŝi komencas paroli multe, kvaŭzaŭ ŝi volus mem surdigi sin, superbrui, ĝis la deka kaj duono. Tiam ŝi rigardas la horloĝeton kaj ekdiras:

— Jam venis tempo por iri.

Kaj ŝi iras plue kun la tute fremda junulo sur malvarme fremdaj stratoj kaj ŝi estas kolera pri si kaj pri la patro, pri la patrino, pri la malbonaj, malicaj fratinetoj kaj pri la jena tute fremda, al Dio la animon ŝulda, junulo. Ŝi scias antaŭe, ke nenio fariĝos el tio. La patro diras al la svattisto, ke li donas dumil dolarojn, sed li ne havas monon. Li atendas miraklojn, la malriĉiĝinta patro. Li konas la hodiaŭajn junulojn, la naiva

patro, li esperas, ke iu el la svatitaj junuloj, ekamos lian filinon, lian amatan filinon, kiu ludas pianon, parolas france kaj recitas la plej grandajn poetojn parkere. Li estas malsaĝulo kaj mal aŭgulo.

Si fariĝas ironie malica rilate al ĉi tiu fremda junulo kaj parolante pri ĝenerallaj aferoj, ŝi aldiras lin:

— Ĉu vi scias? Miriĝas min treege, ke vi tiel bela, inteligenta, saĝa kaj kapabla junulo estas preta edziĝi kun dumil dolaroj... Vi aŭdas? Mi diras al vi, ne faru tion, vi valoras minimume kvin mil dolarojn, ĉu vi aŭdas? Ne malkarigu vin eĉ per unu groŝo!

La junulo sentas sin, kvazaŭ oni priversus lin per sitelo da malvarma akvo.

Aliafoje ŝi scipovas aldiri tian junulon:

— Por kio vi lacigas vin por elserĉi por mi komplimentojn kaj rakonti ŝercojn? Domaĝas vere, mi devas diri al vi la tutan veron: la svatisto trompis vin, mi ne havas doton... Eĉ ne kvincent dolarojn. Ha, ha, vi estas naŭva junulo kaj lasas vin trompi...

Post tia rendevuo ŝi ploras longajn horojn en la lito kaj ŝi leviĝas matene kun forta decido eliri el la hejmo kaj transloĝiĝi al sia kamaradino, la dentistino, la maljuna fraŭlino. Ŝi serĉos oficon, ŝi trovos kelkajn lecionojn pri muziko aŭ ŝi eĉ fariĝos infanedukantino.

SKOLTA ANGULO.

venu al anglujo, kie naskiĝis la skoltismo!

Laŭ permeso de la Internacia Komisaro de la Brita Skoltasocio, la venonta XIV-a Internacia Tendaro de S.E.L. okazos apud Ipswich, la ĉefurbo de graflando Suffolk en orienta Anglujo.

Oni jam starigis Organizan Komitaton (adreso: 54, Constable Road, Ipswich Suffolk, Anglujo).

La Tendaro daŭros de 18-a ĝis 29-a de julio 1936.

*

EĤOJ DE LA XIII. SEL.-TENDARO.

En la esp. gazetoj („La Praktiko“ — Nederlando, „Nia Vivo“ kaj „Kim“ — Hispanujo, „Esperantobladet“ — Norvegujo) aperis bonaj raportoj pri la lasta Tendaro. Ankaŭ en skoltrevuoj ni vidas belajn artikolojn speciale en hungaraj „Zalai Naplo“ kaj „Magyar Cserkész“ kaj en pola skoltrevuo „Skaut“.

*

Sed el la promesitaj oficoj restis nenio, lecionojn ŝi ankaŭ ne ricevas kaj la kamaradino, la dentistino, estas teda kaj histeria. Ŝi enfalas denove en apatikon, interpaciĝas kun la svatisto. Ŝi preskaŭ ne aŭdas, kion li diras al ŝi, tiu svatisto. Estas al ŝi tute egale, oni telefonu.

Kaj morgaŭe post la vizito de l' svatisto, telefonas fremda virveĉo:

— Ĉu mi havas la honoron kun fraŭlino...?

Kaj post unu aŭ du vesperoj ŝi staras denove ĉe la tramostacio, pala pro troo da pudro kaj laceco kaj ŝiaj okuloj jettas ĉirkaŭen melankoliajn nervajn rigardojn... ĝis alproksimiĝas al ŝi tu'e fremda junulo kun malcertaj paŝoj kaj esploraj rigardoj.

— Ĉu mi havas la honoron kun fraŭlino...?

Kun la permeso de l' aŭtoro tradukis
Leono Vienano.

Rimarkigo de l' tradukinto. M. Seĥim estas nuntempa talenta verkisto, kies noveloj kaj humoroplenaj felietonoj ĝuas grandan sukceson. La esperanta legantaro povos en la proksima estonteco konantiĝi pri pluj literaturajoj de ĉi tiu interesa skribisto, kiu celas antaŭ ĉio la aktualecon de la temo kaj la simplecon de la stilo.

SKOLTINA FAKO.

La Centra Komitato de S.E.L. nomis f-inon Mary C. Groen, 20, Hampton Road, Ilford, Essex, Anglujo — kiel ĉefagentinon.

*

NUR 5 ZŁOTY.

„Pola Esperantisto“ estas abonebla por geskoltoj tiom malkare. Abonu ĝin ĉiu geskolta rondo kaj izolulo.

NI TRE AFABLE PETAS NIAJN ABONANTOJN, SULDANTAJN ANKORAŬ LA ABONON POR J. 1935, PAGI LA SULDON JE NIA KONTO PKO No 406.660.

POR KURSGVIDANTOJ!

Bonege konservitan, kompletan, antikvecan kursmaterialon laŭ Ĉe-metodo, bezonigan por kursgvidantoj havigu ĉe „Pola Esperantisto“, Kraków, Lubicz 34. Prezo zł. 18.— kun afranko.

sionoj. Kaj en leĝdona fako ili tre ofte troviĝadis lantaŭ taskoj, kiuj superskreskadis iliajn fortojn. Tial komenciĝis serĉado de elirejo kaj de novaj vojoj. Kaj, ĉar ĝi okazis en momento de specifa agordiĝo popol-psikologia, kaŭzita de la travivita milito, tial ne estis mirige, ke aperis en niaj tempoj iaspecaj mitoj kaj misiadoj, precipe sur la teritorio de bolŝevika Rusio, o, faŝista Italio kaj hitlera Germanlando.

Mesiarismo en periodoj de naciaj malvenkoj jam ekzistis en la historio kaj oni povas ĝin kompreni; ĉu temas pri historio de izraelidoj, ĉu pri „Reden an die deutsche Nation“ de Fichte, ĉu pri nia kristeco de Pollando en tempo de granda poezio romanika. Profunde — kiel kutime — rimarkis profesoro Kleiner, skribante pri verko de Krasinski „Antaŭ-agigo“, ke „la evoluo de ideoj de tiu aŭtoro — estas transiro de pesimismo al optimismo“. Kaj tio donadis al ni fortojn en tempoj de mallibero. Kreskis en tiu malfacilega periodo en koroj de kelkaj generacioj tiu mito kaj tiu mesieco, kiun en antaŭtago de la granda milito esprimis Stanislaw Wyspianski en la konata krio de l' aŭimo: „Pollando estas grava aĵo!“

Kaj kiam — parolante la lingvaĵon de „Liberigo“ — „la provo de tomo“ finiĝis, tiam samtempe realiĝis ankaŭ tiu prievata mito — en formo de la Pola Stato. Ĉi-rilate nia situo en Eŭropo estas aparta, kaj tiom pli, ke ni devis tiun ŝtaton preskaŭ moigauĉe post ĝia reaktiro defendi per armita mano. La realigo de la mito okazis kun grandega kolektiva fortostreĉo. Tial la generacio, kiu unue batalis pri tiu Stato, kaj poste por tiu Stato, sen-as plenforte la neceso de ĝia forta interna konstruado: Post Ulnula venko - programo de Kaziŝimiro.1). Kaj tial ne skuas hodiaŭan Polujon ia misiula superŝtatlima aŭ universalisma mito. Anstataŭe aperis en ĝi forta amasiĝo de fortoj en interno. Kaj el tiu kolektiva fortostreĉo elkreskis en nia konstitucio la koncepto de „Pola Stato, kiel komuna bonhavo de ĉiuj ĝiaj ŝtatanoj“. La realigo de tiu ideo — jen tasko de la hodiaŭa pola generacio kaj programo por tiuj, kiuj venos post ĝi.

Kape de la Stato staras hodiaŭ efektiva ĝia Esiro, pri-dolita per efektiva aŭtoritato kaj samtempe superstara arbitracianto, harmoniĝanta la agadon de la ŝtatorganoj.

DR. KAZIMIERZ WŁ. KUMANIECKI

profesoro de krakova universitato,
eksministro de klerigado.

AKIRAĴOJ DE NOVA POLA KONSTITUCIO.

La prelegon pri la nova konstitucio de Pola Respubliko el 23 de aprilo 1935 mi permesos al mi aŭdiĝi en partoj du: en la unua mi prezentos en tre konciza maniero ĝiajn fundamentajn trajtojn, kaj en la dua mi klopodos respondi la demando: kie kaj kian lokon destinas la nova konstitucio al Pollando inter la ŝtatoj de nuntempa Eŭropo.

PARTO I.

Cefaj principoj de nova konstitucio de Pollando estas jenaj:

I. En la ofico de Statprezidanto ĝi kreis ŝtatestron, kiu

1. estas la kapo de la Stato,
2. koncentras en sia persono unuecan kaj nedividitan ŝtatestradon kaj fine,

3. estas faktoro superstara en la Stato, harmoniĝanta la agadon de la cefaj ŝtataj organoj, kiuj restadas sub lia estrado; li solvas konfliktojn inter ili.

Konforme al tia difino de l' ofico de Statprezidanto la konstitucio distingas inter liaj rajtoj t. n. „prerogativojn“, alivorte personajn povojn. Aktoj, kiuj devenas de tiuj prerogativoj, ne postulas, kiel aliaj, subskribon de ministroprezidanto kaj de koncerna ministro.

II. Sub estrado de la Statprezidanto restadas ok „organoj de l' Stato“. Ili estas:

1. registaro,
2. seĵmo,
3. senato,
4. armeo,
5. juĝistaro,
6. ŝtatkontrolo,

7. teritoria memregado,
kaj 8. mastroma memregado.

III. Respondeco de ministroprezidanto kaj de ministroj,
La respondeco de ili la konstitucio distingas trispecan:

- 1) politikan — antaŭ la Ŝtatprezidanto, 2) parlamentan — antaŭ la leĝdonaj ĉambroj kaj 3) konstitucian antaŭ la Tribunalo de l' Ŝtato.

IV. La konstitucio konas du manierojn por elekti la Ŝtatprezidanton, nome ordinaran kaj eksterordinaran.

1. La ordinara havas du eventualojn:

a). Unu kandidaton elektas Kunveno de Elektoroj, konsistanta el Marŝaloj de ambaŭ Leĝdonaj Ĉambroj, Ministro-prezidanto, Unua Prezidanto de la Plej Supera Juĝejo. Ĝenerala Inspektoro de l' Armeo, kaj 50 elektoroj, elektitaj de Sejmo, kaj 25 de Senato inter la plej indaj civitanoj. La alian kandidaton povas indiki la eksigonta Ŝtatprezidanto. Tiam la civitanaro decidas per ĝenerala voĉdonado pri ambaŭ kandidatoj.

b). La eksigonta Ŝtatprezidanto konsentas kun la elekto farita de Kunveno de Elektoroj. Tiam tiu ununura kandidato estas rekonita kiel elektita por la ofico de Ŝtatprezidanto.

2). La eksterordinara maniero de enoficigo de la Ŝtatprezidanto povas okazi dummilite. En la momento de ĝia eksplodo la oficanta prezidanto destinas sian sekvanton por la okazo de vakuigo de l' ofico antaŭ starigo de packontrakto.

La periodo de oficado de la Ŝtatprezidanto daŭras 7 jarojn, sed dum milito tiu tempo plilongigas ĝis paso de monato post starigo de packontrakto.

V. Projekto de leĝo, voĉdonita de Sejmo, estas transdonata al Senato por esploro. La decidon de Senato, kiu rifuzas la projekton aŭ ŝanĝas ĝin, oni konsideras akceptita, se Sejmo ne rifuzos ĝin par plimulto de 3/5 da voĉoj.

La Ŝtatprezidanto povas dum 30 tagoj post ricevo de leĝo resendi ĝin al Sejmo por reesploro, kio tamen povas okazi ne pli frue ol dum la plej proksima ordinara kunsido. Se la Leĝdonaj Ĉambroj per absoluta plimulto da voĉoj de laŭleĝa nombro da deputitoj kaj senatanoj akceptos refoje la leĝon

sen ŝanĝoj, tiam la Ŝtatprezidanto rekonos ĝian validecon kaj ordonos ĝian publikigon.

VI. La ŝtadadministracio estas rekonita de la konstitucio kiel publika servo. Ĝiaj organoj estas:

1. registara administracio,
2. teritoria memregado,
3. mastroma memregado.

VII. La juĝistaro verdiktas en la nomo de la Respubliko. La juĝistoj estas en plenumado de sia juĝista ofico sendependaj.

VIII. Por kontroli la financan mastrumadon de la Ŝtato kaj de asocioj de publika juro, por esplori la kalkulfiermojn de la Ŝtato kaj por prezenti al Sejmo proponojn pri forirajto (absolutorio) funkcias Plej Supera Ĉambro de Kontrolo, bazita sur la principo de koleגיעco kaj sendependeco de ĝiaj membroj. Ĝi estas sendependa de la registaro. Ĝia prezidanto respondas pri la plenumo de sia ofico laŭ la principoj fiksitaj por respondeco de ministro.

IX. En la konstitucio estas garantiataj principoj sekvan-taj civitanaj rajtoj:

- 1). al laborprotekto,
- 2). netuŝebleco de l' prepraĵo,
- 3). religia libereco,
- 4). nacia libereco,
- 5). libereco de scienco kaj de instruado,
- 6). certigo de normala verdiktado fare de kom-petentaj juĝejoj, konforme al la valida leĝaro.

PARTO II

Jen tiel aspektas la fundamentaj principoj de la nova pola konstitucio. Kaj nun laŭvice ni demandu: kie ni estas?

Respondo je tiu demando starigas nin tuj antaŭ la problemo de rekonstruo de nuntempa ŝtato ĝenerale. Ĝi rezultis el tiu fakto, ke parlamentoj de antaŭmilita tipo mem kreis en fako de kontrolo iaspecan de si n t e r e s s e m e n t, farante el rajto de interpelacio kaj el budĝeta diskuto, politikan batalon, kaj la zorgon pri kalkulfiermoj lasante precipe al komi-

DR. LEOPOLD DREHER.

LINGVA ESPLORO.

En la numero 10-a de P. E. mi trovis jenajn „makuletojn“:

En la artikolo pri Paderewski: „Por festi nome la komencon de kvara jarcentkvarono ktp.“

Ĉu oni ofte diras mianowicie ĉu komence ĉu meze de frazo. Sed en E. tio estas malfacile farebla. Ĉar nome povas signifi ankaŭ imiennie. Tial plej praktike estas skribi ĝin nure je la komenco de la frazo kaj doni post ĝi komon: Nome, por festi ktp.

Anst. „nun li studis enfunde ne nur la ktp.“ prefere mi dirus: ĝisfunde.

Jam kelke da fojoj mi kritike menciis bazi en la signifo opierać się, anst. „baziĝi“ aŭ „esti bazita“. Ambaŭ en ĉi tiu numero de P. E. ni trovas: „...bazantan sur la romano de Kraszewski“, anst. bazitan. Komparu: limi ograniczać.

La vorto „unktätuloj“, kiun la Red. trovis necerta, ŝajnas bona vorto. Anst. „virtuoza“ d. e. virtuoza („preserare“, ĉu ne s-ano Orzech?)

En la artikolo pri Brodziński mi trovis preter, anst. krom, resp. ekster, escepte de. Estas strange. Precipe tial ke

la aŭtoro kvazaŭ intence ne malpli ol 4 fojojn uzis „preter“ en la sama artikolo pri Brodziński, tiel vidigante sian nemiskompreneblan intencon anstataŭigi la uzadon de krom k. s. per tiu de „preter“. Jen la frazoj:

1) „pri kiu neniu zorgis preter maljuna servistino“ (ekster),

2) „Ĉio preter la religio estis instrua germanlingve“ (ekster),

3) „Brodziński postlasis... versaĵojn... pretere unu pli grandan idilion „Wiesław“...“ (krome),

4) „Preter la agado sur la poezia kampo estis Brodziński aktiva en la fako de literaturkritiko“ (Krom, apud).

Parolinte jam iom longe pri Brodziński, la aŭtoro diras pri li: „Ĉiam mankis al fervora junulo...“, anst. al la fervora junulo ktp.

Anst. „tero de miraĵoj“ estas jam enkondukita en nia lingvo la vorto mirlando. (Komp. „Alicio en Mirlando“).

Anst. „li mortis nome en Dresdono“, laŭ supraj rimarkigoj, preferinda estas: nome, li mortis en Dresdono.

Anst. „Brodz. kliniĝas al la tezoj ktp.“

5

La registaro kapablos regi kaj administri, posedante la bezonan aŭtoritaton. Kaj la leĝdonaj ĉambroj, senigitaj de la funkcioj ŝtatregadaj, plenumos agadojn leĝdonajn kaj kontrolajn. Distribuado de aŭtoritatoj estos anstataŭata de ilia interkontakto.

Mastrumado sen budĝeto ne estos ebla, ankaŭ ne bremsigo de leĝdonado kaj administrado.

La sistemo de kontrolo estas ĉiuflanke konstruita.

La konstitucio certigas al la armeo konforman provizon de vivaj fortoj kaj de mekanikaj kaj bezonaj por celoj de defendo elastecon de ĝia konstruado.

Justeplenumado laŭ principo de juĝista sendependeco estas certigita en limoj, indikitaj per la bezonoj de celkonforma organizo de juĝejoj.

Sur ĉiuj ĉi kampoj de la pola konstitucia karto troveblas ritmo de evoluo, penetranta en nia tempo ĝardegan parton de la eŭropa kontinento. En tiu ritmo ofte aŭdeblas skuaĵoj kaj maltrankvilaj, kelkfoje eĉ taŭzaj, pulsobatoj. Tial tiom pli forte, pli klare videblas en la principoj de la pola konstitucio modereco, malgraŭ profundaj ŝanĝoj kaj fundamenta rekonstruo de ŝtatorganizo de Pollando. Ni estas tute plene sur granda historia vojo, sed ni paŝas ĝin kiel faktoro de ekvilibro kaj prudento. Kaj kiam oni pli profunde pripensas la principon, troviĝan kape de la pola konstitucio, ke „Pola Ŝtato estas komuna bonhavo de ĝiaj civitanoj“ nur tiam oni ekkomprenas, ke nur tiel konsideratan ŝtaton povas rilati tiuj vortoj de la saĝa romia imperiestro, Marko Aurelo, skribitaj en kvina libro de liaj „Meditaĵoj“: „Kio ne estas malutila al la ŝtato, ne portas malutilon ankaŭ al civitano“.

Rim. de tradukinto: 1) Władysław I. Łokietek (Vladislav I. la Unulo) 1306—1333, pola reĝo, kiu unuiĝis kelkajn partojn de la ŝtato. — Kazimiro la Granda (1333—1370) ne militis, sed zorgis pri brustato de la nacio, ĝia civilizo, klerigo k.t.p.

pli bona estas la bora esperanta: inklinas al.

Anst. „malirenda“ mi pli ŝatas: propra.

Anst. „polonismo“ oni uzas pli ofte: polismo.

Anst. „kaj poste oni devas eviti ktp.“ pli bora ŝajnas: (kaj) krome oni devas eviti ktp.

Anst. „for la ofendo!“ pli bona eble estas: for la ofendon!

Anst. „rivalizi“ mi preferas: rivali.

Mi treege bedaŭras, ke mi ne povas konsenti kun nia tre ŝatata samideano prof. Orzech, kiu opinias, ke du verboj kunmetitaj, faras en Esp. bonan impreson. Komparu, mi petas, **scípovi**, kiu tute bone sonas, sed estas strange nekomprenebla por multaj. Eble pro tio, ke ambaŭ (scii kaj povi) havas tro similan sencon, tiel ke ili ĝustadire faras neniun novan ideon sed sole la sumon de ambaŭ. Kvazaŭ ili signifus nur: „ne nur scii, sed ankaŭ povi“. Simile estas pri: a endso-**piri**, kiu mem formas neniun novan, siaŝpecan ideon en nia kapo, sed sole la sumon de ambaŭ. Tial „sopiraterdi“ estas eĉ pli ŝatinda, ĉar ĝi almenaŭ sonas pli facile.

*

Sur la paĝo 126 la aŭtorino de „La energia organizo“ diras: „La **sekvontan** tagon nia Johano duon-konŝcie vivadis“.

Kompreneble, kio sekvas, tio venas poste, do esprimas iaspecan estontecon. Verŝajne tio igis nian simpatian kunlaborantinon skribi: la **sekvontan** tagon, anstataŭ...

Jes, anstataŭ kio?

Kelkaj skribas: la **sekvintan** tagon. Aliaj: la **sekvantan** tagon. Niaj Aela'-anoj estas plej spritaj el ĉiuj. Ili skribas simple: la **sekvan** tagon.

Mi mem? La **sekvantan**. Aŭ: la **postean**.

Karl Minor proponis eĉ novan radikon: la **nekstan**...

Niaj karaj eksterlandanoj ne povas de kutimiĝi skribi „unu“ tie kie eĉ en sonĝo pola esperantisto ne kuraĝus skribi „unu“. Ekz.

„La mondlingva demando ne estas unu „hobby“, sed ktp.“

Kompreneble, oni povas skribi: ia „hobby“, aŭ simple ellasi ĝin entute.

*

La numero 11-a de P. E. enhavas:

En la artikolo „Tiel — aŭ inverse“: „kvazaŭ lokusto tiris de la sudo nigraj

AL ĈIUJ E—GRUPOJ EN POLUJO.

Ankoraŭ antaŭ kelkaj monatoj, ni elsendis al ĉiuj E-grupoj en Polujo la statuton de P. E. D. kaj ĉirkuleron kun varma peto de aliĝo. Bedaŭrinde ne ĉiuj grupoj respondis ĝis nun nian ĉirkuleron, aliĝinte oficiale al P. E. D.

Hodiaŭ ni ankoraŭfoje venas al ĉiuj konŝciaj grupgvidantoj kun sama peto: aliĝu al P. E. D.! Ni ne instigas vin al aliĝo pro iaj personaj aŭ materialaj motivoj — nur pro la bono de nia Ideo!

Ni devas plenumi du gravajn taskojn: la Tutpolan Kongreson en nuna jaro kaj la Universalan Kongreson en Warszawa en jaro 1937. Kaj nur forta P. E. D. povas reprezenti nian movadon antaŭ la tutmonda Esperantistaro. Ju pli forta estos P. E. D. des pli forta estos Esperanto en Polujo, des pli efikplena estos nia laboro. Nur per kunlaboro de ĉiuj grupoj, ni atingos tion! Nur akurate pagantaj grupoj povos voĉdoni dum la Tutpolan Kongreso. Ni decidi pri la sorto de nia movado kaj pri la sukceso de Universalan Kongreso en jaro 1937.

Aliĝu do nepre tuŝ! Enpagu la kotizon kaj fariĝu vera kunlaboranto de nia movado!

Pollanda Esperanto-Delegitaro.

Rimarko: La kotizo estas (depost la 1. de januaro 1935.) 10 gr. por membro kaj monato. Enpagu je konto PKO: Nr. 411.404. „Delegacja Esperantystów w Polsce“. La statuton ni sendas nur al grupoj, petantaj tion oficiale.

El artikolo de Prezidanto de U.E.A. Intendanto Generalo Bastien en „Paris Esperanto“.

„...Oni scias, ke la Kongreso en 1937 okazos en Varsovio. Ĉar D-ro Zamenhof publikigis sian unuan lernolibron en 1887, tiu Kongreso, kiu havos lokon en la patrujo de la Majstro, estos jubilea. Oni klopodos, por ke ĝin vizitu reprezentantoj de ĉiuj esperantistaj organizoj senescepte, tiamaniere ke ĝi estu vere tutesperanta.“

Al Gesinjoroj Pierre Petit naskiĝis filo Jean-Roger.

Ni gratulas!

soldatoj". Ankaŭ pole oni diras: *ciagnęi* (nadciagali). Sed en Esp. tio ankoraŭ ne estas korekta. Ĉar *tiri* estas transitiva. Dume *nadciagali* portas en si ideon ne-transitivan.

Eble do: *fluis*, *fluadis*, *alirigadis*, *alŝoviĝadis*, *treniĝis*, *alsvermis* k. s.

Anst. „komisio“, kiam temas pri speco de komitato, oni uzas „komisio“^o, por diferencigi ĝin de „komisio“ (ordono).

Anst. „konsterniga novaĵo“ sufiĉas: konsterna.

Anst. „stenografantoj“ sufiĉas: steno-grafoj.

El la art. „Wawel — Pola Panteono“ mi citas: „ensorĉigitaj“, anst. ensorĉitaj.

Anst. „supre disvolviĝas longa renesanca fasado“ mi preferus: etendiĝas.

Anst. „ĵus ĉe la enirejo“ — ĝuste, tute proksime al k. s., ĉar „ĵus“ ni rezervu por difini tempon.

La skolta angulo citas: turistiko, anst. kiu mi pli ŝatas „turismo“, ĉar ĉi lasta jam pli enradikiĝis kaj estas tute bona.

Anst. „kompromitiga“ tute sufiĉas: kompromita.

Anst. lumbildmontrado pere de s-ano Kutschel — fare de.

„Fruktlaboro“ ne estas samsignifa al fruktoporta (-dona) laboro, s-anoj Vilranoi! „Fruktlaboro“ estas nur ia laboro pri fruktoj, sekve fruktkulturado aŭ io simila.

*

Fine ni trarigardu kritike ankaŭ la laste aperintan numeron 12-an de P. E.:

La art. „Kurantaj ĉagrenoj“ uzas laŭ S. A. T. „alie“ anst. aliloke: „Alie lamigis esp-ismon la krizo“.

Ni rimarkas en la sama artikolo la ofte kritikitan de niaj kontraŭuloj vorton „neebla“: „Nun kiam la krizo estas neneebla ktp.“ Kompreneble ne temas pri eraro de la aŭtoro. Temas pri vortludo-specifajo de nia lingvo. Ĉar „neebla“ povas signifi aŭ: ne ebla, aŭ kiun oni povas nei. Nu, por tiu lasta signifo oni povas uzi novan radikon neg' negować, sekve: negebla. („Maljesi“ ne es'us tre plaĉa).

Anst. „estas simile kiel nun en Germanujo kun ministro Goebbels“ pli bone uzu: pri. Komparu miajn antaŭajn artikolojn.

Anst. „kiu forturnigos la atenton de ktp.“ pli korekta estas: forturnos.

„Analogo“ ŝajnas preseraro anst. analogio. Sed ĉe anglolingva esp-isto pli verŝajne tio ne estis nura preseraro, ĉar angloj diras: analogy, eip.: análogo (la fina e estas apenaŭ aŭdebla).

Eferveska“ (angle: effervescent) estas tre bona vorto... angla. Sed ne pli ol anĉala!

En Esp. oni diras: ŝaŭmanta, ŝprucanta.

Anst. „maso“ (pri homoj) oni devas diri: amaso. „Maso“, laŭ Zamenhof, estas esprimo fizikteknika.

El la artikolo „Pollando kaj Poloj“: anst. *idee matematika mezo*, eble pli bone estus resti ĉe nia „ideale“?

Anst. „trafranĉas sin“ pli bona estas: interfranĉas sin.

Anst. „malheleco“ kaj „foreco“ (Mantel) pli bonaj estas: malhelaĵo, foraĵo, ĉar temas pri spaco, ne pri kvalito.

LETERO DE AMIKO EN AŬSTRALIO AL LA MONDO.

GRAFO STRZELECKI ANTAŬ 100 JAROJ.

Antaŭ 100 jaroj, en oktobro, Grafo Strzelecki (aŭ Strezlecki, Strelski, S'relenski, Streletski, Stlenstki, S'releski; ĉi lasta estas la plej proksima angla fonetikaĵo de la pola Strzelecki) eltrovis en Nov-Sud-Kimrujo la altaĵon, kiu hodiaŭ portas nomon Kościuszko. Jus nominte tiun, la plej altan monton en Aŭstralio (7340 futoj), li skribis: La aparta formo de tiu ĉi altaĵo tiel forte frapis min pro ĝia simileco al la surtombajo (tumulus) en Krakovo sur la lasta kuŝejo de la patrioto Kościuszko,¹⁾ ke malgraŭ ke mi sin trovis en fremda lando, sed inter libera popolo ŝatanta la liberecon kaj ties sindediĉulojn mi ne povis ne doni al ĝi la nomon Monto Kościuszko“.

Grafo Strzelecki, patrioto, esploristo,

geologo filantropo, verkisto kaj inĝeniero, naskiĝis en provinco Poznań en 1796. Li absolvis la universitato de Krakovo antaŭ ol li devis pro politiko fuĝi en Anglujon de la tiam subpremata Polujo. Li ĉiam emis fremdlande vagadi, kaj liaj vojaĝoj inkluzivis Nord- kaj Sud-Amerikon de Ĉilio ĝis Kalifornio Ĥinujon. Orientan Indion, Havajon, Rusujon, Nov-Zelandon Oceanion kaj Aŭstralion. La Sydney Gazette“ (Aprilo 27, 1839) anoncis la alvenon de „Monsieur le Comte Traliski eksa de la Pola armeo“ kiel pasaĝero de la Franca barko Justice, kiu atingis la havenon antaŭ du tagoj de Sud-Ameriko, voje de Tahitio kaj Nov-Zelando.

Ĉiam kun scienca celo li paŝis la mon-

don, kaj li verkis multajn fakajn traktatojn, kiuj portis konsiderindan profiton al la scienculoj anglaj. Lia unua verko: *The Physical Description of New South Wales and Van Diemen's Land*: estis presita en Londono 1845. Oni rigardis ĝin kiel la plej fidindan verkon pri Aŭstralio ĝis tiam aperintan en Anglujo. Sur la unua paĝo Strzelecki metis la principojn de devo laŭ kiuj esploristoj agi: ne refuti la eksperimentojn de aliaj homoj, nek prui ilin eraraj, sed eltrovi la veron, la puran veron.

La libro enhavas la rezultojn de liaj topografiaj observoj en Suda Aŭstralio. Ĝi tuŝas pri la klimato, geologio, botaniko kaj zoologio, krom la fizika kaj socia stato de la indiĝenoj en ĉi tiam nekonata terparto. Ĝi montris sur faktojn kolekteblajn nur per lia akirmaniero, nome, longlonga piedmarŝo de 7000 anglajn mejlojn tra la plej nature danĝeraj regionoj de Aŭstralio. Pro tio ĉi li ricevis la ormedalon de la Reĝa Geografia So-

cieto en 1846. Li mortis en Londono 1873.

Major-piloto Karpiński en la lastaj tagoj ekiris de Varsovio, fluge al Aŭstralio, por viziti ĉefurbon Canberra, kaj Sydney. Li revenos kun teraĵo prenita de-el Monto Kościusko, kaj fine metos ĝin solene sur la pormemora altaĵeto (tumuluso), kiun oni konstruas en Krakovo memore al Marŝalo Piłsudski.

R. Banham, Melbourne.

Rim. de la Red. La leteron, devenantan de fino de oktobro 1935, ni presigas sen ŝanĝe. Cetere niaj legantoj bone scias, ke majoro Karpiński estis devigita reveni, ne atinginte Aŭstralion, pro malfeliĉa akcidento.

1) Monteto de Kościuszko estas surŝutita honore al li, sed ne enhavas ĝiajn restaĵojn, kiuj troviĝas en Wawel.

POLLANDA KRONIKO

CHORZÓW. (antaŭe Królewska Huta). Okaze de la librotago la Rondo Esperantista aranĝis la 15. 12. solenan „Zamenhofvesperon“ ligitan kun Esp. ekspozicio. Malgraŭ la ĉie sentebla krizo la aranĝo bone sukcesis. Partoprenis ĉ. 150 pers., inter ili kelkaj eksterlokaj samideanoj kaj unu eksterlanda. La salutkaj festparoladojn faris S-ano E. Kołodziej, prez. de Rondo Esp. en Esperanto kaj pola lingvoj.

Li parolis pri la signifo de la librotago kiel ankaŭ pri la signifo de Esperanto kaj vivo de D-ro. L. L. Zamenhof. La ĉeestantoj atente aŭskultis la paroladojn kaj precipe la neesperantistoj.

Kvarvoĉe kantitaj Esp. kantoj alterne per deklamoj plibeligis la vesperon. Per komuna kanto de la „Himno“ Esp. dum kiu unu s-ano allentenis nian Esp. flageton, la solena parto estis finita. Sekvis poste la dua parto t. e. vizito de la ekspozicio kaj reciproka interkonatiĝo.

Rimarkinde estas, ke la Esp. ekspozicio tre mirigis la neesperantistojn kaj oni aŭdis laŭdindajn voĉojn. Ankaŭ la porblindula parto de la ekspozicio estis interesa, kiun nia blinda s-ano H. Kłyk prizorgis por la bono de U. A. B. O.

Citinde estas ankaŭ, ke dum la tuta vespero ĉeestis du deĵorantaj policaroj, kiuj tre interesiĝis pri Esperanto. La solena Zamenhofvespero restos longe en la memoro de la ĉeestintoj kaj certe la

jam dubintaj samideanoj estas refreŝigitaj por plua laborado je la bono de nia afero.

KNURÓW. La 13-an de decembro 1935. fondiĝis esp.-grupo „La Espero“, konsistanta plejparte el novaj esperantistoj. Adreso: Waldemar Porwoll por „La Espero“, Knurów, Marsz. Piłsudskiego 15.

KRAKÓW. Societo Esperanto en Kraków aranĝis la 17-an de decembro k. j. en bele dekorita granda salonego de Industria Muzeo solenan akademion por memoro al naskiĝtago de nia Majstro. Malfermis la vesperon nia ŝatata prezidanto, prof. dro Bujwid, kiu ankaŭ uzis la solenan okazon, por mencii en kelkaj kortuŝaj vortoj pri la morto de nia neforgesebla Marŝalo, Józef Piłsudski. La publiko honoris Lian memoron per ekstaro kaj unuminuta silento. Poste deklamis esprimplene belan poemon de Irena Szczepańska nia jam konata juna artistino Roma Manberówna. Tre harmonie kaj ritme, kvazaŭ malgranda orkestro sonis „Trio“ de Dancla, ludata de f-ino N. Bertizanka kaj s-ro inĝ. Sandhaus sur violono kaj de s-ino prof. Stein sur piano. Mallonge klarigis s-ro Kutschner al la aŭskultantaro pri la signifo de „La tago de la Libro“. Tre plaĉis la pianludo de fraŭlino Streissenberg. Carma f-ino Lucja Rubinstein rikolis speciale multajn aplaŭdojn por la kortuŝa deklamado de bela poemeto s. t. „Sono-

riloj" de Ujejski, tradukita en Esperanton de s-ro T. Hodakowski, kun muziko de funebra marŝo de Chopin. Tre bone aŭskultiĝis la diskreta pianakompano de s-ino Glücksman. Bele kantis jam bone konata kantisto s-ro prof. Czesław Kozak, kies kantojn akompanis subtile s-ino J. Pruszyńska. Fine ludis vere artplene juna violonisto s-ro inĝ. Sandhaus. Lia ludo, akompanata de s-ino prof. Stein vekis grandan entuziasmon. Per himno Espero finiĝis la bela vespero, kiun partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj.

*

S-ano Ludwik Kutscher, sekr. de P. E. D., prelegis en decembro 1935. pri „27-a Universala Kongr. de Esp. en Italujo kaj ekskurso al Tripolis" (kun lum-bildoj) en Białystok (2 prelegoj — ĉ. 200 aŭskultantoj) kaj en Łódź (2 prelegoj — ĉ. 200 aŭskultantoj).

LWÓW. La 8-an de decembro 1935 fondiĝis **UKRAINA ESPERANTO-SOCIETO**. La Ĝenerala Kunveno elektis tian Komitaton: prezidanto — Ilczyszyn (Ilčyšyn) Johano, vicprezidantino — Wołoszczak (Voloŝčak) Izydora, sekretario — Skotyński Tadeo, kasisto — Rezynek Stefano, mastro — Pyrożyński (Pyroŝynŝkyj) Anatolo.

WARSAWA. La 16. 12. 35 Societo Turisma de E-istoj en Polujo (STEP) aranĝis vesperon okaze de „Festo de la libro". La ĉeestintoj atente aŭskultis la prelegon de s-ano Grenkamp-Kornfeld, estinta hazardo en Varsovio, kaj interesaĵojn el esperanta mondo, kiujn rakontis s-ano adv. L'tauer. Mallonge, sed tre bele kaj sprite parolis nia ŝatata s-ano Leo Belmont, kiun la ĉeestintaro varmege aplaudis. Okaze de la „Festo de la libro" oni aĉetis iom da libroj.

WILNO. La sola (aktiva) Esp. rondo en Vilno — T. E. R. O. ĉe Z. T. K. aranĝis la 14-an de dec. solenan Esp. Akademion honore al la 76-a naskiĝtago de nia Majstro, kun la partopreno de Viena s-ano d-ro A. Mildwurf. La akademion malfermis s-ano S. Szyk (v. prezidanto de T. E. R. O.), kiu invitis al la prez. da tablo s-anojn d-rojn: A. Gurvicz, A. Goldburt, M. Perelman, A. Mildwurf, s-anojn M. London (V. A. E. R.) kaj A. Mendes (Z. T. K.). Post kantado de l' Espero dro Perelman disvolvis esp. flagon kaj s-ano Subotnik deklamis la „Preĝon sub verda standardo". Sekvis paroladoj: de dro A. Gurvicz pri dro L. Zamenhof, de dro A.

Goldburt pri L. Tolstoj kaj Zamenhof (du batalantoj por la homa bono), dro M. Perelman pri Zamenhofaj idealoj kaj s-ano S. Szyk pri la historio, signifo kaj bezono de ĉiuj 27 universalaj Esperantaj Kongresoj. En la muzika-voĉa parto de la Akademio partoprenis s-ano Alperowicz, L. Subotnik (kiu deklamis tri originalajn versaĵojn de dro A. Goldburt, l. ŝuster kaj L. Subotnik) M. Minkow kaj A. Gajfen. S-ano S. Szyk tralegis la alvenintajn salutojn de familio Zamenhof, L. Dreher, E. Wiesenfeld, Leo Belmont, Z. T. K. (Warszawa kaj Łódź) Makabi (Suwałki) kaj de Ĉeĥoslovaka Esp. Rondo (Praga). Poste dro A. Mildwurf havis interesan prelegon s. t. Aŭstrio, lando de la 28-a U. Kongreso. Nia esp. orkestro ludis „Esperon" kaj „tagiĝon". En salono estis aranĝita ekspozicio de plakatoj, gvidlibroj, fotografajoj kaj bildoj de Aŭstrio. T. E. R. O. de Z. T. K. aranĝis grandan konferencon de Vilna gazetaro, dro Mildwurf kaj s-ano S. Szyk informis al reprezentantoj de vilnaj gazetoj pri historio, signifo kaj utileco de Esperanto. En ĉiuj Vilnaj gazetoj estis grandaj artikoloj pri dro L. Zamenhof kaj pri Esperanto.

La Redakcio—Administracio de „Pola Esperantisto" kaj mi persone ricevis tiom da bondeziroj okaze de la Novjaro, ke ni ne povas respondi al ĉiuj niaj Amikoj por separataj leteroj. Tial ankaŭ ni ekuzas la okazon tiamaniere danki speciale al:

F-ino Lidja Zamenhof (Hyeres), g-oj Roome (Sheffield), s-o Holger Hansen (Holbäk), s-o J. Henriksen (Holbäk), Lichmer Oertel (Tokio, ni petas adreson!), s-o Vilmos Bleier (Budapest), s-o Franz Hub (Gablonz a/N.), s-o Albert Barthel (Pirna-Copitz), s-o Jan Van Schoor (Antwerpen), s-ino Hilda Drezen (Tallinn), s-o J. Nenkomm (Pompey), s-o Stanisław Kauzik, f-ino Halina Weinsteinówna, s-o Ad. Oberrotman, s-o Edward Wiesenfeld (ĉiuj el Warszawa), s-o inĝ. M. Chmieliński (Łódź), s-o Emil Kołodziej (Chorzów), s-o Stanisław Pęksa (Zakliczyn n/D.), s-o S. Szyk kaj Turista Esper. Rondo (Wilno) kaj s-o J. Epszajn (Lida).

Prof. Dro D. Bujwid.



28. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO,

Wien 8—15. de aŭgusto 1936.

Komuniko Nr. 1,

Adreso: Esperanto-Kongreso, Wien. I. Neue Burg.

Kotizo en aŭstriaĵ silingoj: por kongresanoj 48.—, por familianoj 30.—, por gejunuloj malpli ol 18 jaraj 20.—. **Helpkongresanoj** (grupoj, societoj, institucioj, firmoj, kiuj deziras montri sian simpatian al la kongreso, por helpi ties sukceson kaj por ricevi ĉiujn kongres-dokumentojn, sed ne sendos reprezentanton) pagas aŭstr. ŝil. 20.—

Favorkotizoj por frupagantoj: ĝis 31. de januaro 1936. aŭstr. ŝil. 34.— 21.— kaj 14.—; ĝis 30. aprilo 39.—, 24.— kaj 16.—; ĝis 30. de junio 43.—, 27.— kaj 18.—

Glumarkoj: Tre belaj glumarkoj en 5 koloroj po 100: svis. fr. 0.70. Ricevebla ĉe L. K. K.

Kongressiftoj: 2 ekzempleroj kune kun 3 belegaj gvidlibretoj kontraŭ 1 poŝta

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 80.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 84.

KONTO P. K. O. NR. 406.660.

respondkupono. Ricevebla ĉe L. K. K.

Radio-dissendadoj: Komencinte la 2. de oktobro okazas ĉiun merkredon de la 18 h 30 ĝis la 19 h Radio-Esperanto-kurso el Radio—Wien. Je la fino de la kurso, do proksimume de la 18 h 50 aŭ 18 h 55 ni komunikos ĉiun merkredon informojn pri la kongreso, eventuale respondos demandojn.

Avantaĝoj de frualigo: Ricevo sen-paga de la kongresgazeto Aŭstria Esperantisto jam do l' monato de la aligo; pli bona sidloko en la teatro por la prezentado de l' opereto „La Blanka Ĉevaleto“; certigo de sidloko kaj de partoprenebleco en la Turisma Servo „Tra Aŭstrio“, ĉar nur certa nombro povos partopreni en ĉi tiu unika vojaĝo kaj tiel malmultekosta.

Tra Aŭstrio: Por tiuj samideanoj, kiuj ne sufiĉe frue aliĝos al „Tra Aŭstrio“ aŭ ne deziras partopreni en ĝi, la aŭstria fervojo kaj ŝipkompanio estas je dispcno je rabatita prezo. Detaloj sekvos. Tiuj s-anoj kompreneble ne vidas tiom kiel la aliaj

Restado en Wien kaj Aŭstrio sufiĉe malmultekoste aranĝota de LKK.

Fervojrabatoj: En Aŭstrio 25% rabato sur la fervojoj; sur la ŝipoj pago de unu vojo por tien kaj reen-veturadoj.

Kontraŭ intern. poŝta respondkupono sendas L.K.K. la belan varbnumeron kun 3 belaj gvidfolioj.

Pluajn informojn en venonta komunik. Demandojn postulu de Pollanda Esp.-Delegitaro. Kraków, Lubicz 34. Aldonu nekre poŝtmarkon por respondo.

Ludwik Kutscher
Ekz.-ano d P.E.D.

DALSZA OBNIŻKA ABONAMENTU!

Každy abonujący miesięcznik „Pola Esperantisto“ na rok 1936, wpłaca do dnia 31. stycznia br. t y l k o zł. 7.50. Poza to każdy ma możliwość zaabonowania pisma „Informoj de Estonio“ względnie „Ondo de Daŭgava“ za 1 zł. rocznie! Ilość ograniczona! Korzystajcie z okazji!

Równocześnie prosimy uprzejmie o wyrównanie zależności za rok 1935. Konto PKO Nr. 406.660 lub przekaz rozrachunkowy, kartoteka Nr. 29.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 pago zł. 80.— 1/4 pago zł. 15.— 1/8 pago zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

